



aktuala

36-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Eltiro 150 ekzempleroj.

Informoj: www.esperantobruselo.org; aktuala.retejo.net; br11.leadhoster.com; ebg.skynetblogs.be; uea.org; paulo.retejo.net; barelo.blogspot.com; esperanto.net; esperanto.be; lernu.net; liberfolio.org; eo.eventeo.net

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Poemaro de Alberto Garcia Orive de Bilbao
- Paĝo 3 - Proverboj kaj diraĵoj de Rob Keetlaer en proverbaro.net
- Paĝo 4 - Meditado de Elmir dos Santos Lima el Brazilo
- Paĝo 7 - Atesto de Hubert de Meyere por Peko, dua parto daŭrigo
- Paĝo 8 - Somero kaj nacia tago 6.6 laŭ Kerstin Rohdin el Stokholmo
- Paĝo 9 - Filmo, pri Kapitalismo laŭ Jakvo Schram el Antverpeno
- Paĝo 11 - Transsiberia vojaĝo laŭ Pieter Enkwirda el Nederlando
- Paĝo 16 - Pri Anglikanismo, Episkopanismo, Metodismo, Kvakerismo
- Paĝo 19 - Frandu trian KuKon de André Demarque en Loveno-La-Nova

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

EBGrupo ferias dum Julio, Aŭgusto kaj duono de Septembro

Julio 2011

- 9-16 47aj Baltiaj Esperantaj Tagoj el Priekuli translokiĝis al Malpils, Latvujo
- 23-30 96a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, Danujo
- 30-6.08 84a SAT Kongreso en Sarajevo, Bosnujo-Hercegovino

Septembro 2011

- 14 Bernard-Regis Larue, nia dumviva membro, prelegas pri vojaĝo al insulo Malto
- 21 Rodica Todor, nova prezidanto de IFEF, prelegas pri sia lando Rumanujo
- 28 Piet Glorieux, el Kortrijk, prelegas pri Klimata Varmiĝo de Nia Planedo

Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

POEMARO: *EN MIA FANTAZIA ŜIPO*

En blanka ŝipo-utopio
sur blua maro, mi ŝipiras;
ruĝaj sunradioj subiras
transe horizonto-magio.
De la oceanoj, genio;
vento-sago, de la aero;
navigas tra la monda sfero,
drivante sen rumbo preciza,
pere de milda aerbriza,
mia vela ŝipo etero.

Ŝipiras sur blua maro,
sur la blua maro arĝenta;
ŝipiras sur la nigra maro,
sur la nigra maro silenta.

Ŝveligitaj ĉiuj la veloj
ŝajnas grandkolombo magio
farita de Neptuno dio,
mia velŝipo de fabeloj;
sub la brilaj helbluaj steloj,
sur la vasta maro serena.
Desfaldita l' velaro-plena,
kiel belega estas mia
ŝipo plena de harmonia
figuro en maro edena!

Ŝipiras sur la maro-kresto
sur la blanksauma mara ondo;
ŝipiras sur Neptuna nesto
tra ĉiuj rumboj el la mondo.

-Turnu la rudon, komodoro,
ke jam foriris la lumsuno
kaj la arĝenta mara luno
sur la marakvo-senkoloro,
ĝis la naskiĝo de la aŭroro,
signos la padon de la luna
lumo tra kiu mia skuna

ŝipo, iras sur la ondaro
ĝis la fino de l' nokta maro
de post l' periplo oportuna.

Ŝipiras per trankvila vento;
per freŝa brizo, ĝi sopiras;
sed la aera elemento
el la ŝipaj veloj foriras,

Navigas kun pruo aera,
de ĉiuj la ventoj ventsago,
kiel subluma marimago,
mia vela ŝipo ĥimera.
La celo estas la mistera
horizonto. Sed en la maro,
l' fato solviĝas en l' ondaro;
la horizonto, ĉiam kuras
de la destino, tuj forkuras
de la fato de l' ŝipano.

La ŝipo, puŝita de la vento,
sur maro de brila metalo
kaj, sub sunbrila firmamento,
navigas al sia fatalo.

En la velŝipo el ĥimero
mi estas ŝipano-solulo
irante kiel somnambulo
kun mieno grave fiero.
En ĉi velŝipo el espero
vi estos mia ŝipistino;
mia ĉefa kapitanino:
brila suno de la mateno
kaj nordo de la stelo-ĉeno,
en mia periplo-senfino.

Vi estas tiamaniere,
mia pilotino diina;
mia stelnordo mare-tere;
mia gvidistino, Regina.

Alberto Garcia Orive, Bilbao

PROVERBOJ KAJ DIRAĴOJ

Pri temoj kun vortoj:

nomo, lando, regno, limo, popolo

Kia la homo, tia lia nomo

Laŭ la agoj de l' homo

estas lia nomo

Malsaĝulo ĉie sian nomon skribas

Nomo egala, sed esenco mala

Por hundon dronigi,

oni nomas ĝin rabia

Unu fojon ŝtelis pomon

kaj perdis por ĉiam

honestan nomon

Mankis al Petro klopodoj,

li aĉetis al si domon

Petro kornojn tenas,

Paŭlo lakton prenas

Petro parolas sen direkto,

sed Paŭlo konjektu

Petro rifuzas, Paŭlo ekuzas

Petron kruro doloras,

Karolo ne lamas

Por Paŭlo sperto, por Petro averto

Se Peĉjo ne semos,

Petro ne rikoltos

Vizaĝo de Katono,

sed virto de fripono

Kiso antaŭ amaso

estas kiso de Judaso

Ne ĉiam estas sankta Johano

Amu Antonon,

sed gardu vian monon

Demeti de si la antikvan Adamon

Komenci de Adamo

Parenco per Adamo

Bona estas fremdlando,

sed aliaj tie loĝu

En landoj transmaraj

estas oraj arbaroj

Fremdlando objekton por speso

donas, sed por ĝin venigi,

oni spesmilon bezonas

Peto kaj demando

kondukas tra l' tuta lando

Pri lando malproksima

estas bone mensogi

Por regna speso

ne ekzistas forgeso

Regna kaso — bona ĉaso

Fremda animo

estas abismo sen limo

Klopodoj sen limo

per korpo kaj animo

Malpaco pro limo fariĝas kutimo,

malpaco pro kredo fariĝas heredo

Pensoj iras trans limo

sen pago kaj timo

Pro limoj kaj baroj

malpacas najbaroj

Popola kutimo

havas valoron de leĝo

Popolo diras, Dio diras

Venas proverbo el popola la cerbo

France saĝa, angle sovaĝa

Formeti ĝis la grekaj kalendoj

Ĝi estas por mi hina scienco

Aŭskulti kiel hinan predikon



Rob Keetlaer en proverbaro.net

MEDITADO

Bazaj principoj por tuja uzado de meditado. La mondo estis alia en la pasinteco. Nuntempe ni ricevas nur en unu tago tion, kio egalus al ses semajnoj da stimuloj kaj informoj. Tiel oni estas premata kaj superŝarĝita ĉirkaŭ 40-oble pli lerni kaj adaptiĝi al novaj situacioj. Pasinttempe la homo vivis sur mondo preskaŭ senŝanĝa. Oni forlasis tiun ĉi mondon en la sama situacio kiun siaj gepatroj forlasis. Tute ne gravis lerni multe; do tial ekzistis en niajmensoj “spacoj”, kiuj multe helpis subteni nian mens-ekvilibron, sed nun ne plu ekzistas tiaj lokoj, tiaj rifuĝejoj, nur se ni proprvole ilin estigos. Ĉar oni fakte ne sukcesas haltigi la menson, ĉies klopodoj sindirektu al enfokusigo kaj limigo de ĝia interveno. La plejmulton el la streboj por kvietigi la menson oni nomis “meditado”. Kiam ni sukcesas tion okazigi, kelkaj pli subtilaj kaj rafinitaj meĥanismoj de la menso, kelkaj subkuŝintaj tavoloj de la mensa funkcio fariĝas pli evidentaj, malmergiĝas. Kaj de tio venos alproprigo al ni de pli da trankvileco kaj sereneco, pli altvalora interrilato kun la proksimulo krom konado de ni mem (“memkonado”), ĝuste tio, kio plej gravas. Nuntempe meditado staras ankaŭ surkampe de neŭroscienco, kies efikon sur cerbaj regionoj tre avangardaj teknikaj rimedoj montras, ekz. radiologiaj esploradoj, kiuj

evidentigas funkciajn cerbajn strukturojn (ekz-e magneta resonanco). Meditado tute ne estas io apartenanta al la menso. Ĝi estas io transen de la mensokapablo, ĉar ofte la menso pelas vin al via egoo, parto de la personeco, kiu juĝas, decidas, malkonsentas, do tio ne plu estas meditado. Finfine, kio estas la menso? Lastinstance la menso estas via pasinteco konstante strebanta kontroli vian nunecon kaj vian estontecon. La menso daŭre restas parolanta kiel specialisto pri efikeco. Kiam la personoj demandis al Osho, hinda majstro, pri meditado, li respondis ke tio devas esti kiel restadi neokupita, tio estas ĉio, tio ĉi estas la atuto por sukcesi rilate meditadon, unuvorte nenifareco. Almenaŭ kelkajn minutojn en la tago, nenifareco estas la maniero moviĝi internen. Teni sin okupita signifas forkuron, kaj tio estas falsa senkulpigo por resti en eksteraja dimensio, sur la supraĵo de la vivo. La efikon de la meditado oni devas pacience atendi. Memoru, ke kiam vi el ekstera suna tago subite eniras domon, viaj okuloj bezonas adaptiĝi. Post tio, ĉio estos lumo, ne plu ekzistos mallumo. Iom post iom la mallumo en via menso malaperos, tamen ne ekzistos suno, sed ia lumo simila al tiu de matenruĝo, ia lumo sen perceptebla fonto. Meditado komenciĝas kiam vi apartiĝas disde la menso kaj ĉi-momente vi fariĝas nura atestanto. Ekz-e, se vi rigardas floron, certe vi ne estas tiu

floro kaj kiam vi rigardas la menson, same ne estas vi la menso. Nur rigardu tion, kion la menso aperigas nome pensojn, priokupiĝojn, imagojn, ktp. Faru nenion, estu nura observanto kvazaŭ vi distre trarigardus vidindaĵojn aŭ bildojn surekranajn. Dum la menson vi nur rigardas, iom post iom, ĝi malpleniĝas je pensoj, unu post alia ili forpasos kaj tiel vi ekkomprenos, ke atesti estas tute malsama ago ol pensi. Pere de tiu ĉi observado senjuĝa, senanaliza, vi tuj liberigos vin de la menso, ĉar ĝi ne plu sukcesos regi vin. Iom post iom maloftiĝos tiuj pecetoj da intertempoj inter la pensoj kaj post ties malaperoj, ekaperos ia kontinueco, via konscienco iĝos kontinua, vi ne plu bezonos uzi la menson ĉi-momente. Ekde tiam vi agos laŭ via konscienco kaj laŭ via menso. Vi estos ĝuste tio, kio vi fakte estas en la realo, plu nenion vi kaŝos. Vi ne plu bezonos senkulpigojn, elturniĝojn, pretekstojn aŭ klarigojn. Multe pli beliĝos via personeco krom la kondiĉo natura, ke vi emas al frateco kaj amo, ĉar esperantistoj. Vi ja fariĝos pli atentema, pli vigla kaj pli konscia. La menson oni senhalte uzas tre ofte senutile kaj senbezone kaj tute forgesas kiel “malŝalti” ĝin. 70-80 jarojn de la vivo ĝi restas senĉese laboranta, ĝisfunde laciĝinte. Pro tio multaj personoj perdas la inteligenton en malfrua aĝo. Se vi sukcesos ĝin ripozigi kelkajn minutojn ĉiutage, ĝi ja rejuniĝos,

5
elmergiĝos pli vigla. Meditado igas vin mastro kaj la menson sklavo, ĉar pereiga fariĝas la situacio kiam regas la menso, sed ne kiam mastras via konscienco. Meditadi estas enfokusigi la intertempojn (kie ekzistas “silento”) inter la pensoj. Kiam vi enfokusigas la intertempojn, la vortoj en via menso perdiĝas, kaj vi estas tirata en meditado. Antaŭ ol praktiki almenaŭ unu el inter pluraj ekzistantaj metodoj, jen kelkaj konsiloj

1 – Komence plibonas meditadi nur mallongajn periodojn. Ĉiutaga kelkminuta praktikado pli efikas ol fojfoja plurhora sesio (20-minuta sesio bonas)

2 – Oni ne devas porti ĉe si la ansion havi ian sperton transcendan. Tion kelkaj atingas, kelkaj ne. Kaj tio probable okazos se ni faros de la meditado rutinaĵon.

3 – Elektu lokon relative silentan.

4 – Ne estas konsilinde meditadi dum vi estas laca. Evidentas la kialo: vi tuj ekdormos;

Jen kelkaj facile konstateblaj profitoj rezulte de la meditado:

- Ekvilibras metabolismon, sangpremon, kor-ritmadon kaj spir-frekvencon.

- Ebligas ripozon ses/okoble pli efika ol dormo, liverante pli da energio.

- Preventas maldormon, ansion, emocian malekvilibron kaj psiko-neŭrozojn.

- Plibonigas koncentriĝon, rezonadon kaj pensklarecon.

6
- Disvolvas kreivecon, perceptadon kaj memfidon.

- Malpliigas streson kaj muskolan tension.

Por meditadi la du unuaj zorgoj devas estri la korpa pozicio kaj la spirado. Rilate la korpan pozicion (komence sidiĝinte):

- Nature ripozu viajn piedojn surplanke, sed konscie, sentu bone la piedplandojn.

- Vertikaligu la vertebran kolumnon kaj la kapon kun la kolumno. Rilate la spiradon: ni devas konscie atenti la kvar tempopartojn: enspiro – paŭzo – elspiro – paŭzo. Kaj fine malstreĉi la tutan korpon, klopodi percepti ĉu ekzistas ie punktoj de tensio (ĝenerale ĉe la nuko kaj ŝultroj) kaj kontroli la ritmon de la spirado atentante la movojn de la abdomeno (levon kaj mallevon).

Estas apenaŭ eviteble, ke vi fojfoje deflankiĝu de via atentemo al la spirado, ĉar venos pensoj pri farotaj taskoj, priokupiĝoj kaj eĉ timo. Tuj post percepti la distriĝon, reprenu la fadenon kaj turnu ree vian atenton al la spirado. La pensoj devas esti nuraj bildoj surekranaj, kiuj ne longe restos, ne analizu aŭ respondu al ili. Se vi tion faros, vi falos en kaptilon de la menso kaj tio ne plu estos meditado. Faru ĉion-ĉi preferinde kun fermitaj okuloj. Alveninte al la fino de la praktiko, antaŭ ol malfermi la okulojn, lante moviĝu, movu la fingrojn, malstreĉu la tutan korpon. Jen alia metodo (urĝa metodo kiam vin regos subita

anksio, kolero aŭ premo de la ĉiutagaĵoj):

- sidiĝu silente kaj fermu la okulojn

- malstreĉu la tutan korpon kaj turnu vian atenton al la spirmovo

- kunigu la pintojn de la fingroj longa kaj la montra (la longa sur la montra) kaj kunigu la du kun la dika.

- enspiru profunde, poste malrapide ellasu la aeron tra duon-malfermita buŝo dum vi kalkulas de dek ĝis nulo plene konscie kaj tute koncentriĝante sur ĉiun kalkulitan numeron.

- kiam vi atingos la nulon, enspiru kaj elspiru malrapide trifoje por nur poste malfermi la okulojn.

Krome valoras la penon okazigi kelkajn ŝanĝojn en la maniero sin nutri. Ĉefe eviti viandon, kafon, ĉokoladon, refreŝigaĵon, alkoholaĵon, sukeron, ktp.

Tamen, se ni disdegnos la bezonon meditadi, nia psiko-neŭrozo eble ne estos akcidenta aŭ hazarda, sed ĝin estigas ni mem. Pitagoro liveris al ni gravan konsilon: “Ne faru el via korpo la tombon por la animo”, kaj “Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu”, asertis iu Nazaretano. Laŭmezure kiel vi praktikos meditado, tuj malkovros, ke tiu kapablo fariĝos via dua naturo, kiu interplektiĝos kun la ordinaraĵ aktivecoj de la ĉiutago, pli valorigante ĉion. Mirinde, ĉu ne? Bonan vojaĝon ...

Elmir dos Santos Lima, Brazilo
INKO, informilo de KKE 10/2008

ATESTO DE HUBERT (dua parto)

Atesto de Hubert De Meyere por PEKO, Unua Printempa Esperantista Kongreso, Kastelo de Mozet, ekde la 20a ĝis la 22a de majo 2011 pri «Plibonigi la komprenon inter belgaj komunumoj» estis iu temo de la kunveno.

4. Argumentoj kaj kelkaj trafaj ekzemploj

Nun en Flandrujo, la FL sukcesis kontroli preskaŭ ĉion, dank'al tenado de la plej gravaj postenoj: amaskomunikilo, universitatoj, lernejoj, financaj kaj ekonomiaj decidaĵoj.

Kelkaj ekzemploj. Siegfried Bracke estis dum jaroj ĉefa politika analisto de la nederlandlingva ŝtattelevido kaj nun konita kiel ĉefpensisto de la naciista partio NVA. Prof. Hannes de la Universitato de Gento eldonis ekonomian falsesplorrezultojn. JM Dedecker bone konata pri sia «populista» konduto.

Cu eĉ en esperantaj movadoj?...Mi timas ke «jes»!

Dum IREM2011 en Seto, la prezidanto de FEL estis la unua kiu eĉ ne menciis la nomon de sia lando. Tio ŝokis mian edzinon Michèle, sed ne nur ŝin. Iu kataluna amiko demandis al ni: ĉu Flandrujo ne plu apartenas al Belgujo? Li diris: «kvankam mi sentas min ĉefe katalunon, mi ne imagas dum esperanta internacia kunveno ne diri ke mi estas hispano». Kelkaj semajnoj poste, dum la malfermo tago de la centra oficejo de UEA en Roterdamo, la sama prezidanto de FEL prezentis min al eksterlandoj amikoj kiel «el

7
iu departemento de Francujo: Valonujo». Li certe volis ŝerci, sed neniu ridis, ĉefe ne mi kiu ankoraŭ havis en la menso lia miskonduto en Seto. Se mi volus inventi atestojn por pruvi la validecon de miaj analizoj, mi certe ne kapablus trovi iun tian trafan ateston.

La flandra popolo, kiu daŭre aŭdas FL-ajn mesaĝojn, finfine opinias, ke ili verdiras. Parolante pri la FL, mia patro ofte diris: «ili estas lupoj kaŝitaj sub ŝafaj feloj».

Dum la plej granda parto de mia vivo, mi provis klarigi la flandrajn postulojn kiujn mi trovis tute ĝustaj. Sed post la balotado de junio 2010, mia konduto tute ŝanĝis. La lupoj forĵetis la ŝafajn felojn kaj montras sin tiaj kiaj ili vere estas.

Finfine, revenante al la malsama konduto de la idoj de italaj emigruloj kaj de flandroj en Valonujo, oni konstatas ke ambaŭ tute ne plu parolas la gepatran lingvon. Tamen granda diferenco ekzistas. La italoj sentas sin bonvenaj ĉi tie kaj en sia antaŭa lando. La flandroj sentas sin bonvenaj en Valonujo, sed en lia patrodevena regiono ili sentas sin malestimataj, malŝatataj kaj forĵetataj, kaŭze de la superregado de la FL-oj en politiko.

5. Propono pri privata debato

Mi proponas la «kriegspiel» metodon kiu estas prusa ekzerco inter oficiroj en kluboj. Oni estas amikoj, sed oni batalas inter si por lerni de la alia. Oni ne povas ŝoki la alian ĉar estas ludo, sed estas bona metodo por malkovri la veron kaj malveron. Mi provis inici la metodon ene de mia familio, sed

8
ĝis nun, neniu reagis. Mi alvokas flandrajn kandidatojn.

6. Lasu nin iomete revii

Imagu ke en Belgujo malaperis netoleremon kaj mankon de respekto inter la komunumojn. Kian paradizan landon ni havus! Niajn tre komplikajn instituciojn oni povus draste simpligi. Ĉiuj povus plene rikolti la fruktojn de niaj komplementaj spertoj. La flandranoj estas bonegaj komercistoj kaj organizantoj, la valonoj brilaj elpensistoj kaj teknikistoj, la bruselanoj, sprita miksaĵo de ĝermana kaj latina kulturo. La germanparolantoj malfermas vidon sur la ĝermana mondo.

Jen ekzemplon kiu bone ilustras ke ĉi tiu kunlaborado eblas.

Unu el miaj kuzoj estas komercinĝenero, diplomita de la antverpena universitato. Dank'al la bonaj rilatoj inter niaj du familioj (lia patrino estas fratino de mia patro) tre ofte ni kune ferias unu ĉe la alia, do li bone konis Valonujon. Kiam li obtenis sian diplomon, li proponis siajn servojn al valonaj enterprenoj. Hodiaŭ, li estras malgrandan eksport-enterprenon kiu zorgas pri eksporto el la valona glasindustrio: Glaverbel, Saint Roch, ktp. Li longtempe laboris en arabaj landoj, ĉefe Saŭda Arabio. Kompreneble, ne estis ĉiam komforta vivo, ĉefe por sia edzino, kiu devis akcepti la malfacilan vivon de fremda virino en islama lando. Nun, ili loĝas apud Antverpeno. Dum iu familia manĝo, ni parolis inter gekuzojn pri belgaj komunumaj problemoj. Li diris: «mi tage laboras kun

valonoj, kaj povas atesti ke ili estas ĉarmegaj kolegoj». «Estas agrabla vendi kvalitajn produktaĵojn elpensitaj kaj fabrikitaj en Valonujo».

Turisme, nia malgranda lando havas tiom da historiaj, naturaj, kulturaj riĉecojn ke ni povas tutjare ĝui ĝin sen fari longajn kaj multekostajn vojaĝojn.

Imagu ke malsprita naciismo malaperas. Imagu ke la lingvaj limoj «dissolviĝas» en plurlingva ŝtato. Certe Esperanto helpas. Utopiistoj kiel mi klopodas por plenigi tion idealon.

7. Ĉeflibroj

- Prof. Michel Quévit: «Flandre – Wallonie: Quelle solidarité? 2010, Couleur livres asbl, Bruxelles («Flandrujo - Valonujo: kia solidareco?»)

- Le Soir: «SAGA BELGICA»: 180 ans de conflits communautaires. (180 jaroj de komunumaj kvereloj. Eldono 2010).

- Henri Pirenne: «Histoire de Belgique» (Historio de Belgujo). Historia: «Nos gloires» (Niaj gloroj)

- von Clausewitz: «Vom Kriege» (Pri milito).

Hubert De Meyere,
hubert.demeyere@gmail.com

SOMERO

Somero kaj la nacia tago 6-an de junio. Somero. Suno. La grizaj rokoj en la Stokholma arkipelago. La ekstrema terpinto de Djurgården (la antaŭa ĉasejo de la reĝoj). Malnovspeca kafejo farita por homoj en pli frua mondo. Mi rekonas kafejon de mia infanaĝo.

La tabletoj verdkoloraj – simplaj seĝetoj. Sur la akvosurfaco venas ŝipeto, kiu trafikas inter la insuloj. Ĉe la tabloj ĉirkaŭ mi sidas maljunaj paroj, ĉiam la viroj pli kadukaj ol la virinoj. Certe ili revas pri siaj junjaroj kaj ilin revivas.

Plurloke en la Stokholma arkipelago restas la vivo de la 1930-aj jaroj. Apud mi staras malnova pomarbo. Ĉe mia alia flanko flagstango kun sveda flago. Okazas nia nacia tago kaj mi lernis, ke antaŭ duonjarcento la flagoj ne estis oftaj inter ordinaraĵoj, sed nur sur ŝipoj kaj boatoj laŭ la marbordo aŭ ĉe militistaj taĉmentoj. Ankaŭ nia populara historiisto Herman Lindquist rakontis, ke origine la sveda flago devenas de la 13-a jarcento kaj estas la dua konata plej malnova ankoraŭ ekzistanta flago en la mondo aŭ diru ni de Eŭropo. La plej aĝa estas Dannebrog, la dana flago, kiun Dio faligis super la danoj, kiam ili militis en Estonio en la mezo de la dektria jarcento. Ĉar Dio helpis al la danoj ili kompreneble venkis kaj la reĝo estis nomita Valdemar La Venkulo. La svedoj kopiis la krucon sur sian flagon kaj elektis kolorojn flava kaj blua de blazonoj de tiama, fama nobela familio.

Jen iom da historio, dum mi rigardas la boatojn kaj velŝipojn sur lago Mälaren – la lago, kiu renkontas "La Salan Lagon" = la Balta Maro ĉe la Kluzo meze en Stockholm. (Nur en tiu loko oni uzas la nomon "la sala lago" Saltsjön).

Pli fore en la lago Mälaren situas/as la "ĉefurbo" Birka, kiu estis vigla

urbo en la jaroj 800-1000. Tien migris la misiisto Ansgar el sudaj landoj por paciĝi kaj kristanigi nin. Jam antaŭ jaroj la arkeologoj elfosis tiun urbon kaj nun troviĝas interesa muzeo, kiu rakontas pri ĝia urba vivo.

La mevoj krias kaj dividas sian intereson inter fiŝetoj de la lago kaj kukoj de la kafejaj tabloj. La homoj ĝuas ankoraŭ unu belan someran tagon. Kvar blankaj cigoj salutas min.

Kerstin salutas vin, Junio 2011

Kerstin Rohdin, Stokholmo,
k.rohdin@home.se

FILMO PRI KAPITALISMO

La mondo dividiĝas en homoj kiuj adoras kapitalismon kaj homoj kiuj kontraŭbatalas ĝin. Kiu pravas? Mi faras demandon, al mi mem pri kiu respondo ne estas memevidenta. Antaŭ kelkaj tagoj mi spektis filmon de Michael Moore: "Capitalism: A Love story!". Jes mi scias Moore estas tre polemika figuro. Tamen, mi jam spektis plurajn filmojn de li kaj notas ke li ne donas respondojn, sed faras demandojn. Jes estas la momentoj kiam li parolas kaj agadas. Ĉiam kun sufiĉe da humoro. Plej amuze estas kiam li iras al la grandaj bankoj de Novjorko kaj petas ke ili redonu la monon de la usona enloĝanto kiun bankoj forŝtelis atribuante tro altajn kaj malhonestajn rentumojn. Li nur petas la monon, kiun la grandaj bankoj ŝtelis de la homoj el Usono kaj mi ne povis deteni silente aplaŭdi en la mallumo de la kinosalono. Kiam filmo finiĝis homoj aplaŭdis, aplaŭdis ĝis oni

enŝaltis lumon. Mi vidis multajn homojn kiuj membras en unu de la komunistaj - maoistaj partioj. Kaj mi faris al mi demandon; ĉu ili kuraĝas same kritiki la partipolitikan sistemon kiun ili subtenas? Ĉu ekzistas sistemon kiu ne meritas kritikon kaj kial ni ne ĉiuj rajtas libere kritiki ĝin? Moore komparas kapitalismon kun la iama Roma ŝtato el la jaroj nul kaj ĉirkaŭe. Ŝtato kiu subakviĝis pro vanteco, pro fakto ke ili ne respektis la homojn kiuj vivis en aŭ suferis pro la sistemo. Plej verŝajne tio estas la historio de la popolo. Ĉiam ili akceptas subpremon ĝis tago ke ili diras: sufiĉe nun kaj ili sange, jes, plejofte sange ribelas, protestas, batalas por havi novan pli bonan sistemon. Bona sistemo en kiu tuj reaperas la profitimulojn, la demagogojn, kiuj havas novajn verojn. Ne por servi la popolon, sed por pliriĉigi sin mem. Por ekspluatadi kaj profiti pri laboro de aliaj kaj ili donas al sistemo belajn nomojn kaj ŝovelas monon en propra poŝo. Homoj estas entreprenemaj, laboremaj kaj ruzaj. Kaj ili serĉas la truojn en sistemoj per kiu ili povas ekspluatadi, profiti kaj subpremi. Kiel bele sonas vorton demokratio precipe kiam oni povas adaptiĝi ĝin al propra gloro kaj profito. Regi la amason estas sonĝo de potenco, de politiko kaj ĉiam ili sukcesas, ĉar la amaso estas manipulebla, sed ankaŭ fleksebla. Sen kritike ili lasas sin sklavigi kaj plispertigas pri lekado de kalkano de tiuj kiuj regas. Ili akceptas ke potenco ornamas sin per titoloj de reĝoj kaj prezidantoj kaj huraas kiam la

potentataro pasas, vestita en oro kaj sateno. Kaj ĉiu epoko aperas iun Moore kiu kritikas kaj demandas. Kie estas la mono de la popolo, kion vi faras per ĝi? Ĉu por nova milito, por plifortigi ŝtaton kiun la potenco kreis por dividi homojn en klasoj kaj grupetoj? Oni flirtigas flagojn kaj simbolojn por ke la popolaĉo salutu ĝin kaj klinas kapon por speceto da kotono. Ni parolas pri prapatroj kiel pri barbaroj kaj samtempe barbaras sen pripense al kio ni submetigas nin. Kvazaŭ ili volas oferti al filozofoj novajn teoriojn pri kiel mondo devas turniĝi, kaj mondo ne obeas sed daŭrigas akcepti popolon stultecan ĝis morto. Antaŭ multaj jaroj, mi staris budon de Amnestio Internacia, kaj mi memoras kiel hodiaŭa tago, ke temo pritraktata estis homaj rajtoj en Ĉinio. Aperis grupo da maoistoj kiuj severe atakis min ĝis ĝojo de mia kuracisto kiu devis ripari la vundojn kiujn mi suferis. Mi simpatias kun ekonomia sistemo de Karlo kaj Frederiko kaj estis batita de la adeptoj pri sistemo malhumana. Mi ne perdis fidon en Karlo nek en Frederiko, sed jes en ĉiu politika klano maltolerema, ĉu ili maskiĝas kiel kapitalistoj aŭ komunistoj. Mi ne kondamnas sed faras demandojn. Kaj ĉiam la demandoj estas: kial ni lasas nin subpremi de reĝoj kaj prezidantoj kaj sistemoj kiujn ili oraklas? Kiam homoj komencas pensi kaj regi sin mem? Mi havas 64 jarojn kaj volas atingi 100, nur por havi respondojn al miaj demandoj: kial ni lasas nin regi de krimularo

maskita en malsamaj kostumoj de superklaŭnoj?

Skribis Erasmo de Roterdamo "*por la saĝulo neniam ja agrablas vivi*". Ili, la potenculoj, neniam estas Minerva aŭ la saĝo, ili paradas kiel simioj en purpuraĵo, kiel azenoj en leonfeloj. Apartenu nek al patrioj nek al partioj, estu homoj veravidaj, senigitaj je ajna egoisma penso. Nek mastroj, nek estroj, nek apostoloj kun lingvaĵo konsiderata kiel evangeliaj vortoj: fuĝu de idolojn kaj serĉu nur la simplan veron en la paroloj de la plej karaj amikoj, de la plej kara profesoro. *Aldone, atentu ke la profesoro ne estu subaĉetato de la potenco de unu el la sistemoj altrudataj.*

Jakvo Schram, Antverpeno, Belgujo, 23.01.2010

TRANSIBERIA

Pri la trajnvojaĝo tra Siberio al 6a Tutazia E-Kongreso en Ulanbatoro, Mongolujo, dum Junio 2010. Jam dum la 94a UK en Bjalistoko, dum 25a Julio ĝis la 1a Aŭgusto 2009, mi aŭdis pri la 6-a Tutazia E-Kongreso en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolujo. Tiu ĉi ege interesas min. Tra diversaj retmesaĝoj mi lernis ke estos karavano organizita per REU (Rusa Esperanto-Unio), eĉ de Moskvo ĝis Ulanbatoro pere de Trans-SiberiaTrajnlinio. Post la unua malagrabra sperto kun la Jokohama UK en 2007, nun en tiu ĉi vojaĝo mi ne estis sola. La organizanto estis Tatjana, aktiva rusa virino kiu jam antaŭe organizis karavanojn. Ŝi multe helpis inter alie pri la vizoj: ĉiu partoprenanto ricevis hejme

11

personan invitleteron rete kaj per poŝto de la prezidantoj de la REU kaj de la mongola Esperanto-Societo! Ŝi sendis tre regule interesajn cirkulerajn leterojn pri siaj planoj. El Nederlando estis krom mi ankaŭ Ineke Emmelkamp de Esperanto Nederland. Por la vizoj oni devas sendi la paperojn por Mongolio al Bruselo kaj por Rusio al Hago. La mongola vizo venis rapide, sed la rusa konsulejo jam anoncis en sia retpaĝo ke daŭros tre longe por akiri vizon. Akiri malmultekostan flughileton estas problemo, ĉar senrevena bileto estas plimultekosta ol irerevena bileto. La aliĝkoston mi pagis al Tatjana en Rusio per mia nederlanda banko en du tagoj!

Ĉiuj partoprenantoj devis veni al Moskvo kie estis la rendevuo la 7-an de junio. Tatjana persone akceptis la partoprenantojn en la flughaveno, tio estas granda laboro, ĉar Moskvo havas du flughavenojn kaj la partoprenantoj alvenis ĉiuj en diferencaj tagoj kaj horoj... Aparta problemo estis la pasportkontrolo, kiu por Ineke kaj mi daŭris kvar horojn!! De la flughaveno ni vojaĝis per trajno kaj metroo al nia hotelo. La moskvaj metrostacioj estas tre belaj, sed kiom da ŝtuparoj! La 8-an de junio ni kolektiĝis en la halo de la hotelo. La grupo estis kompleta. Finfine ni estis 24 homoj el 7 landoj: 17 el Francio, 2 el Portugalio, 1 el Italio, 1 el Belgio, 2 el Nederlando, 1 el Usono!! La plej aĝa estis 81-jara! Du plenplenaj tagoj en Moskvo atendis nin. Kun Tatjana kaj Svetlana, esperantistino el Moskvo, ni vizitis

12

la plej gravajn turistajn monumentojn: Kremlino kun siaj belaj preĝejoj, diversaj aliaj belegaj preĝejoj, ŝipveturado sur la moskva fluo, vizito de la tombejo Novodievitĉin en kiu estas multaj famaj rusoj, kiel Jelcin, la edzino de Gorbaĉov, famaj artistoj, ktp. Ankaŭ ni ĉeestis Eugène Onegin, opero de Ĉaikovski en la bela teatro Nova Opero. Ni ricevis resumon en Esperanto! Dum nia ekskurso estis interese vidi la moskvanojn: multajn junajn homojn, belajn kaj belevestitajn virinojn kun altaj kalkanumoj. Ankaŭ ni vizitis fotoekspozicion de la ĉarma samideano el Bretanio Gabriel Quéré kaj lia edzino en la okazo de la jaro de la franca-rusa amikeco. Ili akompanis nin en la trajno ĝis Irkutsk. Intertempe ni eksciis ke Tatjana estis instruisto ĉe la Militakademio. Tiun ĉi ni devas scii, ĉar ŝi daŭre ordonis: "*Rapidu, rapidu! Aŭskultu! Haltu! Ne krokodilu! Enbusiĝu!*", ktp. ktp. Ŝi ne akceptis ke speciale la francaj virinoj krokodilis! Tamen en la franca grupo estis escepto: Martine, ĉarma francino el la sudo de Francio, kiu antaŭ ne longe komencis lerni, kiu kvazaŭ neniam krokodilis kun siaj samlandanoj, ĉar ŝi volis kapti maksimume la vojaĝon por plibonigi sian konon de la lingvo.

Al mi okazis malagrabra afero. Kiam ni prenis la moskvan metroon oni ŝtelis mian monujon kun eŭroj, kredit- kaj bankkartoj, rubloj, ktp. Kompreneble mi tuj telefonis al mia banko por bloki miajn bankkartojn. La sekvantan tagon mi ricevis mesaĝon en mia

ĉambro ke oni trovis mian monujon en iu metroostacidomo (en mia monujo estis karteto de la hotelo). Tatjana insistis akompani min al tiu stacidomo ("Tiu ĉi stultaj eŭropanoj!" Ŝi preskaŭ diris). Efektive mi retrovis mian monujon, sed sen la bankkartoj kaj sen mono. Ekde tiu ĉi momento mi havis monoprolemon. Je mia demando Ineke akceptis esti mian bankon. Do kiam mi bezonis monon mi konsultis mian personan bankon kaj ŝi retiris de la bankaŭtomatoj rusajn rublojn aŭ mongolan tugrikojn. Hejme mi pagis la prunteprenitan monon en eŭroj al la bankkonto de Ineke.

Je la 10-a de junio fine komenciĝis la trajnvojaĝo de 6300 kilometroj! Je la 13:10-a horo la trajno forlasis la stacidomon. Tatjana aranĝis la lokojn en la kupeoj, ĉiuj kun kvar dormlokoj por viroj kaj virinoj. Mi estis kun Marcel Delforge el Belgio, Remy el Francio kaj Arnold Victor el Usono. La tutan trajnvojaĝon tiu ĉi grupo estis kune en la sama kupeo. Sub la benko estas kesto en kiu oni povas meti kofron. Alia loko por kofroj estis supre, loko kiu fakte estis super la koridoro. En ĉiu vagono laboras du virinoj (vagonakompanantino = provodnitca) ofte studentoj kiuj volas gajni monon, kiuj laŭ vice dum la tago kaj dum la nokto vendas diversajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, purigas la koridorojn, kaj kiam oni haltas en la stacidomo, malfermas kaj fermas la vagonpordon, kaj fermas la necesojn duonhoron antaŭ alveno en stacidomo kaj malfermas ilin nur duonhoron post la forlaso de la

stacidomo. En ĉiu vagono estas samovaro, ujo kun varmega akvo por mem fari kafon, teon, supon, ktp. En la vagono estas skemo de trajnhoraro, do ni scias kiam oni povus uzi la necesejon! Ne estis duŝo, nur akvujo por iom lavi sin! La rusa fervojo en la tuta lando, do inkluzive de Siberio, uzas la moskvan horon por praktika kialo, ĉar estas sep horoj de diferenco inter la plej okcidenta kaj la plej orienta parto de Rusio. En la trajno oni forgesas la diferencon inter punkto kaj tago. La panoramo estis bela, belega. Kelkfoje ebena, aliffoje iom da montetoj, kaj vilaĝoj kun bestoj, industrio ĉe la urboj, sed ĉiam kaj ĉie betuloj, miloj da betuloj, riveroj, kampoj kun bovinoj. Mi ne prenis multe da tempo por legi. Ofte ni parolis unu al la alia aŭ en la kupeo, aŭ en la koridoro, aŭ en la restoracia vagono. En la restoracio estis nur ruslingva menuo, sed kun helpo de Tatjana aŭ de Arnoldo, kiu bone parolis la rusan, ni povas mendi niajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Plej ofte estis en la restoracio homoj el nia grupo. Por la rusoj verŝajne la prezoj estas tro altaj. Ili preferas aĉeti en la stacidomoj kiam la trajno haltas. En kelkaj stacidomoj la trajno haltis 20 aŭ 45 minutojn, eĉ en la punkto. Sur la kajo venis rusoj por vendi plej diversajn aferojn: kristalajn lampojn, glasojn, sed ankaŭ renburitajn rabbirdojn. Foje unu franco de nia grupo, Nicolas, ludis bekfluton sur la kajo, kiu dancigis kelkajn vojaĝantojn. Folkloro spektaklo! Feliĉe por mi abundas kukoj, fruktoj, manĝaĵoj, kolbasoj,

13
trinkaĵoj (akvo kaj biero). En mia kupeo mi poste bone manĝis kaj trinkis. La grupo en la trajno estis dividita en du lokoj, iomete pli kaj malpli komfortaj dormlokoj. Post tri punktoj ni alvenis en Krasnojarsk, 900.000 enloĝantoj, 4104 kilometrojn de Moskvo. La esperantogrupo tie akceptis nin entuziasme. Ni restis unu punkton en hotelo, ke mi ne povas imagi ke ekzistus plej trista loko en la mondo. La esperantistoj aranĝis agrablan programon: vizito al muzeo, promenado tra la urbo, manĝo en memserva restoracio. Esperantistino mem faris patkukojn (blinoj) kun ruĝa kaviaro. En iu restoracio post la vespermanĝo ni ĝuis internacian vesperon. Francoj kantis kaj dancis folklorajn kantojn, Nicolas ludis sian bekfluton, Ineke kunportis KD-on de Kajto- *Lokomotivo, rulu nun!* Ni aŭskultis kelkajn kantojn kaj poste Ineke donacis la kompaktdiskon al la klubo. Rusoj gitarludis kaj kantis, mi dancis kiel frenezulo ekbruligita pro la atmosfero de la vespero. Estis vere internacia vespero en la profunda Siberio, eĉ antaŭ la komenco de la kongreso!! Grandega sperto! Mi imagis ke Siberio estas dezerta regiono, sed Krasnojarsk estas granda urbo en la mezo de Siberio, kun multaj bonvivaj homoj, belaj grandaj parkoj, facilaĵoj, teatroj. Nova punkto en la trajno sekvis. Frumatene ni alvenis en Irkutsk, kun 600.000 enloĝantoj, 5.184 kilometrojn de Moskvo. Loka esperantisto Konstantin atendis nin. Vojaĝagentejo prizorgis nian restadon en Irkutsk kaj la insuleto

14
Olkhon en la Baikallago (1500 enloĝantoj). Estas bela lago kun interesa insulo. Nia tranoktejo estis iom primitiva (por viziti la necesejon oni rajtas punktan promenadon!), sed la ĉirkaŭaĵo estis bela. Vespere kun ekstera fajro, homoj faris tradician muzikon kaj kantojn kaj kompreneble vodko! Ni bone varmiĝis (per la fajro aŭ per la vodko?). Ni faris belan tutagan boatekskurson kun lunĉo sur la Bajkal-lago. Suno, iom da vento. En la lago vivas speciala fiŝo, omul-fiŝo. Ni manĝis ĝin preskaŭ ĉe ĉiu manĝo. En la "ĉefurbo" de la insulo, Khuzhir, ni vizitis interretkafeon kiu estas ankaŭ turist-informejo, (memorigaĵo-) vendejo, ktp. en vera mongola jurto!!
La vojaĝo de Irkutsk al Ulanbatoro daŭris du punktojn. Ĉe la limo de Rusio al Mongolio ni devis entute atendi 9 horojn. Evidente de Irkutsk ĝis Ulanbatoro ni ne estis en la Transmongolia Eksprestrajno! Sed se vi matene vekiĝas kaj malfermas la kurtenojn kaj vi vidas la ebenaĵojn kun jurtoj kun ŝafoj kaj ĉevaloj - tio donas specialan senton: jen estas Mongolio! La 19-an de junio, je la 6:10 horo la trajno alvenis en Ulanbatoro, 6304 kilometrojn de Moskvo. Gustatempe, neniu prokrasto. La rusa fervojo havas famon de akurateco, ni spertis. Eĉ en tiu ĉi frua mateno de la unua tago de la kongreso la prezidanto de la LKK, kun kelkaj samideanoj atendis nin kaj veturigis nin al la kongresejo, la luksa hotelo Ghingis Khan. En Mongolio ĉiu grava afero

rilatas al tiu ĉi fama civitano, inter alie la flughaveno, biero, kvankam li vivis en la 13-a jarcento... Mi iris kvaronhoron piede al mia malluksa hotelo, kaj je la 7:30-a horo mi jam ĝuis bonan duŝon! Tatjana estis feliĉa ke ŝia tasko finiĝis! En tiu ĉi momento ni devis ekkoni la lokan monon. La Tugriko ne havas moneron, nur biletojn, kaj mil tugrigoj valoras duonan eŭron, do vi imagas ke ĉiam oni kunportas kaj pagas pakon da (tre uzitaj) biletoj. Terura afero!
Ulanbatoro havas 1,5 milionojn da enloĝantoj kompare al la 3 milionoj en la tuta lando. Mi imagis ke la ĉefurbo de tiu ĉi magia lando Mongolio devus esti tre speciala. Tute ne. Estas ege malbela urbo en soveta stilo. Trotojroj aŭ piedvojoj apenaŭ ekzistas: multaj truoj aŭ vojo parte malaperinta. Multaj malnovaj domoj, sed en la centro de la urbo grandaj modernaj konstruaĵoj, ofte oficejoj aŭ (luksaj) vendejoj kaj konstruiĝas multaj novaj, ĉiuj kun grandaj reklampaneloj en la angla. En la centro estas ankaŭ la Parlamento, luksa konstruaĵo kun impona statuo de Ghingis Khan. Tra la evoluo post la disfalo de la soveta imperio la nombro de aŭtomobiloj aŭ veturiloj, multaj luksaj kaj ĵipotipoj, multe kreskis. Tio ĉi kun la fakto ke Ulanbatoro estas en valo kaj la domoj uzas lignovarmigon kaŭzas ke la polucio en la urbo estas tre serioza: multe da homoj en la strato uzas buŝtukon. Oni vidas multe da neegaleco: bonvestitajn homojn, ekzemple en la hotelo, kaj en la strato multe da malriĉeco!

La 6-a Azia Esperanto-Kongreso okazis de la 19-a ĝis la 23-a de junio 2010. Estis pluraj prelegoj kaj aliaj programeroj. La programo similas al tiu de UK kun Interkona Vespero, Mongola Vespero, Internacia Vespero. Mongola muziko estas tre speciala. Lundo estis nacia vespero kiu ne okazis en tiu ĉi luksa hotelo en kiu estis la kongresejo, sed ni iris buse al milit-akademio en alia loko en la urbo. Mi unu momenton pensis ke tiu ĉi estus ligita kun la fakto ke Tatjana estis instruisto en rusa milit-akademio, sed eble ne estis. Estis belega vespero!

Mardon okazis oratora konkurso, la ĵurio ne bone klarigis la regulojn, do ĉiuj tri partoprenantoj ricevis premion! Juna mongola esperantisto, Tuya, ludis pianon. Ĉi profesie ludas, sed bedaŭrinde la piano havis malpli da kvalito. Por la aŭkcio Ineke donacis kompaktdiskon de Kajto. Iu aĉetis ĝin por 35 eŭroj! Post tiu ĉi oratora konkurso oni anoncis ke infankoruso devas kanti iomete. Mi ne povas priskribi tiun ĉi ege belan vesperon kun kantoj pere de diversaj (infan)korusoj kaj gekantistoj en diversaj belaj tradiciaj kostumoj. Nekredeble laŭ kia maniero la mongolaj kantistoj povas ludi per sia voĉo! Estis dua nacia vespero!

La franco Pierre kunportis tre bongustan vinon el Francio. Li profesie scias multe pri vinoj. Li invitis kelkajn geamikojn (inkluzive de Tatjana kaj Renée Triolle, UEA-komisiito pri Unesko), kaj ni trinkis bonan

15
francan vinon en la hotelĉambro de Ineke. Agrabla etoso!

La kongresan libron ni ricevis nur lundoposttagmeze. La teksto de iu ministro ne alvenis ĝustatempe. Al mongolaj esperantistoj mankas la sperto por organizi kongreson. Ankaŭ ili ne ofte vojaĝas al eksterlandaj kunvenoj. La temo de la kongreso estas *Azia harmoniigo per Esperanto*. Al la prezidanto de LKK Ineke donacis kompaktdiskon de Kajto. Miaj donacoj estis tipe nederlandaj poŝtkartoj, nederlandaj Esperanto-poŝtmarkoj, tipe nederlandaj pralinoj. Partoprenis ĉirkaŭ 200 esperantistoj ne nur el Azio, sed ankaŭ el Eŭropo, Aŭstralio, eĉ du homoj el Norda Koreio! La salonoj en la kongresejo havis la nomojn de famaj mongolaj esperantistoj: Khayankhirvaa, Rinchen, Dogsuren, Lee Cho-yeong. La plej granda salono estis kiel ĉiam Zamenhof salono! Mi aŭdis prelegon pri la mongolaj esperantistoj. Mi partoprenis en duontaga ekskurso kun diversaj interesaj lokoj en Ulanbatoro: la templo Gandan, granda ĉefplaco Sukhbaatar kaj la monteto Zaishan. Estis varmega vetero!

Post la kongreso mi partoprenis en kvintaga ekskurso, sude de Ulanbatoro. La 12 partoprenantoj, inter ili Mireille Grosjean el Svislando, komisiito pri UN, kaj Ineke, Arnold kaj francaj geedzoj de la karavano, ni vojaĝis en aŭtobuseto dum multaj horoj kaj kun tre alta temperaturo, kun mongola ŝoforo, mongola gvidantino kaj japana esperantisto por traduki. La gvidantino

16
eksplikis en la japana lingvo al la tradukisto, kaj li eksplikis al ni en Esperanto. La gvidantino tre interesiĝis pri Esperanto kaj post kvin tagoj ŝi povis paroli iomete. Mi ne scias ĉu ŝi volas studi kaj praktiki la lingvon. Ni tranoktis en diversaj jurtoj. En ĉiu jurto estas tri/kvar litoj. Jurto estas granda mongola tendo el felto, facile transportebla al alia loko. Niaj manĝejoj, duŝoj kaj necesejoj estis en lignaj konstruaĵoj. Ni vizitis la malnovan ĉefurbon Kharkorum, sablajn dunojn, bordon de rivero, nacian parkon Hustai kun la sovaĝaj Przewalski-ĉevaloj. La vojoj ne ĉiuj estis asfaltitaj. La pejzaĝo estas belega. Tre vastaj ebenaĵoj kun multaj brutaroj de ĉevaloj, kaproj, bovinoj, kameloj! Mi ne povas bone priskribi kial la ebenaĵo estas tiel bela. Vi mem devus iri! Kun multaj servistoj de niaj loĝlokoj, kun diversaj turistoj, eĉ usonanoj kiuj loĝas en Ulanbatoro, ni parolis pri nia lingvo kaj nia movado (en la angla). En diversaj lokoj en kiuj ni tranoktis okazis koncerto de bela mongola muziko per muzikgrupoj. Mi aĉetis kompaktdiskon! La lastan nokton mi denove trapasis en hotelo en Ulanbatoro, kie mi renkontis denove aliajn karavananojn kiuj partoprenis en aliaj ekskursoj. Multaj esperantistoj iris per la sama flugo de Ulanbatoro al Moskvo (estas nur unu flugo en tago). Nur en Moskvo ni adiaŭis unu la alian! Vespere la 28-an de junio mi revenis hejmen post tiu ĉi nekredebla sperto!

Pieter Engwirda verkis, Marcel Delforge publikigis

PRI PROTESTANTISMO (daŭrigo)

ANGLIKANISMO

Anglikanismo estas la kristanismo de la Eklezio de Anglujo, kiu sendependiĝis de la Eklezio Romkatolikisma en 1534 dum la reĝeco de Henriko la 8a. Li apartigis la eklezion en lia lando por permesi al si ekscedzinigi Katarinan de Aragono, kiu ne povis doni al li filon. La papo en Romo ne permesis la nuligon de la geedziĝo, do Henriko sendependigis la eklezion, nomis sin la kapo de la nova eklezio, kaj tiam permesis la eksgeedziĝon. Anglujaj episkopoj, tamen ne ŝanĝis, do la angluja eklezio ĉiam havas apostolan posteulecon. Dum sia vivo, Henriko la 8-a entute ne ŝanĝis la ritaron de la eklezio, sed post lia morto, protestanta influo pligrandiĝis en la eklezio. La lingvo de la eklezia fariĝis la angla kaj ne la latina. Anglikanismo ne reunuiĝis kun la katolikismo pro tio ke Elizabeto la 1a, reĝino de 1558 ĝis 1603, estis filino de la edzeco de Henriko la 8-a kun Ana Bolena, edzeco kiun la papo ne permesis. Elizabeto devis do fortigi protestantismen en Anglujo por esti legitima kaj tiamaniere havi rajton esti reĝino. En tia granda epoko de la regado de Elizabeto, Anglujo protestantiĝis tiel profunde, ke rekatolikiĝo ne eblis, eĉ kvankam la batalo inter protestantismo kaj katolikismo daŭris ĝis 1689. Multe pli poste, en la 19-a jarcento, kiam la influo de la reĝo iĝis multe malpli forta en Anglujo, anoj de la eklezio

realproksimiĝis al ritoj kaj teologio de la romkatolikismo. Ĉar iliaj gvidantoj estis ĉiuj ĉe la universitato de Oksfordo, tiu movado nomiĝis la Movado de Oksfordo. Ĝi havis grandegan influon sur la ritaro de la anglikana eklezio, kiu nun ŝajnas multe pli simila al la romkatolika rito ol antaŭ ducent jaroj. Estas ĉirkaŭ 70 milionoj anglikanoj en la mondo, precipe en Britujo, Nordameriko, Afriko kaj Oceanio. Anglikanismo estis la ĉefa eklezio en la anglalingva mondo de 1600 ĝis 1800. Nun nur ĉirkaŭ 13% de anglalingvanoj estas anglikanoj. La eklezio nun kreskas plej rapide en Afriko. Anglikanismo komencis kiel sendependa branĉo de la eklezio dum politika disputo inter angla reĝo kaj roma papo. Ĝi estas tre katolikeca, sed, post jarcentoj de protestantiĝado en la kulturo de Anglujo, ĝi nun ofte ŝajnas protestanta en praktiko, kvankam ĝi ankoraŭ estas katolika en rito kaj strukturo. Malsimile al la romkatolika eklezio, sacerdotoj povas edziĝi kaj en iuj landoj, virinoj povas esti ordinitaj kiel sacerdotoj kaj eĉ kiel episkopoj en Nordameriko. Episkopanismo estas la usona branĉo de anglikanismo. Fruaj usonanoj ŝanĝis la nomon por ne havi tiom evidentan ligan al la iama kolonia mastro Anglujo. Anglikanismo estis normigita per la tiel nomataj 39 Artikoloj kaj per la Libro de Komuna Preĝado. La hodiaŭa Anglikanismo tamen havas ankaŭ fortan teologian influon de la Movado de Oksfordo. Anglikanoj havas sep sakramentojn, sed nur du estas

17 necesaj por savo: komunio kaj bapto. La eklezio de ĉiu lando ĝa estas sendependa, sed la eklezioj tra la mondo penas kunordigi doktrinon kaj politikon kaj eviti skismon per la Konferenco de Lambeth, kiu kunvenas ĉiujn dek jarojn. La eklezioj en Britujo kaj Nordameriko estas ĝenerale liberalaj, sed tiu de Afriko estas multe pli tradicia (ekzemple, pri samseksemo kaj demonoj). Same kiel en la romkatolikaj kaj ortodoksaj eklezioj, la episkopoj kaj sacerdotoj estas legitimitaj per apostola posteuleco. Iuj anglikanoj krucosignas. Ankaŭ ekzistas anglikanaj monaĥoj.

EPISKOPANISMO

Episkopanismo estas la usona branĉo de anglikanismo, kiu sendependiĝis el la Eklezio de Anglio je 1784. Ĝi unufoje estis la ĉefa religio de la elito de Usono. En la 20-a jarcento, ĝi modernigis kaj ŝrumpis kaj nun havas nur 2,3 milionojn da kredantoj (1 % el la nacio). Episkopanismo estas pli liberala ol la korpo de tutmonda anglikanismo kaj usona kristanismo. Ekzemple, en 2003, la Eklezio elektis malkaŝan samseksemulon kiel episkopo. Unu emfazo de episkopanismo dum la pasintaj cent jaroj estas socia justeco. La nomo devenas de *episkopo*, ĉar la episkopo estas la plej alta rango en la eklezio.

METODISMO

La metodisma estas protestanta eklezio eliĝinte el la anglikana eklezio fondita de la anglo John Wesley (1703-1791) kaj lia frato Charles Wesley. Ili estas pli liberaj en la ceremonioj kaj la instruoj ol

18

multaj aliaj protestantaj eklezioj. La plej alta eklezia instanco estas la Konferenco. La metodisma eklezio havas du branĉojn: la brita (sen episkopoj) kaj la usona (kun episkopoj). La metodistoj en Eŭropo ekster la britaj insuloj plejparte apartenas al la usona branĉo. La nomo de la metodistoj venas el la nomo de oksforda klubo, en kiu aniĝis la fondintoj dum la studjaroj. La klubanoj havis strikte metotan konduton, pro kio ili ricevis la moknomon "metodistoj", kiun ili poste mem akceptis. La fratoj Wesley estis tre sukcesaj predikistoj kaj "vekis" amasojn. Charles verkis multajn gravajn himnojn. La fratoj estis origine anglikanoj, sed la anglikana eklezio malakceptis ilian agadon, kaj la movado apartiĝis en 1793. La eklezianoj estas pli ol 70 milionoj en pli ol 120 landoj. La eklezio estas plej multnombraj en anglalingvaj landoj (Usono, Britujo, Kanado). La kredantoj devas vivi kun amo al proksimuloj kaj al Dio, ĉiam venki super pekoj kaj konduki ankaŭ aliajn al beateco. Tiel por metodistoj tre gravis la misio, precipe inter la afrikaj kaj usonaj nigruloj. En la metodisma eklezio membras interalie Nelson Mandela, Kofi Annan kaj George W. Bush.


KVAKERISMO

Kvakerismo aŭ Religia Societo de Amikoj) estas religia movado fondita de George Fox en la 17a jarcento en Anglujo. Ĝi radikas en kristanismo, sed krevigis la limojn de ties tradiciaj dogmoj. Ĝiaj anoj kredas ke dia revelacio povas okazi ĉiam kaj ĉie.



George Fox helpis fondi la Religian Societon de Amikoj en 1652. Nuntempe ekzistas ĉirkaŭ laŭreligie 300.000 kvakerojn tra la mondo

Elstaraj diferencoj inter la Amikoj kaj tradiciaj kristanoj estas (a) pli forta akcento de la individua respondeco; (b) la kredo, ke ĉiu homo povas senpere rilati al la dia fonto; (c) la celo reveni al pura kristanismo de la primitiva eklezio sen postaj aldonaĵoj. Ili rifuzas partopreni en ia ajn militado. Ili ne ĵuras, ĉar tio supozigus ke ili ne ĉiam diras la veron. Ili ne praktikas ritualajn sakramentojn, pro sia konvinko, ke la tuta vivo estas sakramenta. Ĉe iliaj religiaj kunvenoj, kiuj povas okazi ie ajn, troviĝas neniu pastro, neniu preĝlibro aŭ ceremonio: ĉiu ĉeestanto, ĉu viro aŭ virino, kunvenas en plena egaleco, sub gvido de la Spirito. La diservo estas plejparte silenta. Sed se iu estas emociita kaj volas paroli, li/ŝi parolas (mallonge). Nuntempe ekzistas ankaŭ kvakeroj kun tradiciaj kristanaj religiaj kunvenoj, kun pastro, preĝlibro kaj ceremonioj, precipe en Latin-Ameriko kaj en Orienta Afriko. Kvakera Esperantista Societo fondiĝis en 1921.



Kovrilpaĝo de "Kial mi estas kvakero"

En Esperanto aperis librojn: Kial mi estas kvakero, Kvakera Esperantista Societo, 1977 ; La Fundamentoj de la Kvakerismo de Caroline Stephens (1890) (tradukis Montagu Butler 1916) ; La Kvakeroj de Edouard Dommen, (tradukis Jacqueline Lépeix ĉirkaŭ 1996).

FRANDU TRIAN KUKON

Kuko estas kurso por komencintoj en universitata urbo apud Bruselo, LLN Loveno-la-Nova. La tria KuKo instruos dum 25 horoj, du semajnfinoj 22,23 kaj 29,30 oktobre 2011, tra rekta metodo, nur en Esperanto, laŭ membro de EBG André Demarque, estrarano de Kvinfolio esperantista asocio de LLN. Jen lia anonco: Ni invitas vin al nia KUrso por KOmencantoj, kiu okazos en Loveno-la-Nova (universitata urbo, proksime al Bruselo). La kurso daŭras du sinsekvajn semajnfinojn (la 22/23-ajn kaj 29/30-ajn de oktobro 2011). La

19
kurso estos gvidata nur esperante, tial ĝi estas malfermita al ĉiuj. Gvidantoj estos Françoise Pellegrin, instruistino en EBG, Jean-Pol Sparenberg, vicprezidanto de APE instruisto en Gosselies, André Demarque, administranto de Kvinfolio organizanto de Kuko, Gunter Neue el Germanio kiu eĉ ne scipovas paroli nek la francan nek la nederlandan. Pago estos 75 eŭroj (ne divideble); 40 eŭroj por la gejunuloj de mapli ol 26 jaraj; 60 eŭroj por la membroj de Kvinfolio, APE, EBG, FEL, pagintaj la kotizon. Pageble je la konto : 979-6251016-50 de "E-kvinfolio" (eksterlande: IBAN BE86 9796 2510 1650, BIC ARSPBE22). Por tiuj kiuj venas el alia lando (aŭ tro malproksime por reiri hejmen sabate), ni trovos loĝejon ĉe Esperantisto.

ademarque @ skynet.be +32 10 412925



Françoise Pellegrin; André Demarque



Jean-Pol Sparenberg; Günter Neue

LUDOVIC BOUTELIGIER



Lerninto kaj membro de Esperantista Brusela Grupo